

Seleco



Presorgano de Astura Esperanto Asocio



Organo de Asociación Asturiana de Esperanto

Numero 79

Octobro 2003



Seleco



Presorgano de Astura Esperanto Asocio
Organo de Asociación Asturiana de Esperanto
Numero 79 Oktobro 2003



Adreso de A.E.A.

C/Begoña, 25-2º

33206 - GIJÓN

Telef. 985 36 29 42

Correo electrónico:

easturias@telecable.es

ASTURA ESPERANTO ASOCIO estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la Internacia Lingvo unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, laŭeble, en tiuj zonoj de la Asturia regiono kie ne ekzistas lokaj E-Grupoj. Nia agado disvolviĝas kadre de la:

La ASOCIACIÓN ASTURIANA DE ESPERANTO es un grupo esperantista que realiza su labor por la difusión de la Lengua Internacional en primer lugar en nuestra ciudad, Gijón, y también, en la medida de lo posible, en aquellas zonas de la región asturiana donde no existan grupos esperantistas locales. Desarrollamos nuestra actividad en el marco de la:

Cátedra «Jovellanos» de Extensión Universitaria

Enhavo

Paĝo

Contenido

Nia laboro
Karolo la 5a kaj Tazonas
JOVELLANOS
Pri ESPERANTO
6a Tutamerika Kongreso de Esperanto
88a Universala Kongreso de Esperanto
Kongresa temo: Lingvaj rajtoj kaj respondecoj
Debato pri la Kongresa temo
La Esperantistoj kaj la asocioj defendantaj la naciajn lingvojn: Natura simbiozo
Simbiozo de esperantismo kaj lingvonaciismo?

Kongresa Rezolucio
Granda Vortaro Hispana-Esperanta
La Esperantista Movado en Hispanio
La plej granda Esperanto-katalogo en Interreto
Kuirante kun Pilar
Sen novaĵoj pri Dio
La rido junigas

3 Nuestro trabajo
5 Carlos V y Tazonas
9 JOVELLANOS
14 Acerca del ESPERANTO
18 6º Congreso Panamericano de Esperanto
20 88º Congreso Universal de Esperanto
32 Tema congresual: Derechos y deberes lingüíst.
34 Debate sobre el Tema congresual
Los Esperantistas y las asociaciones defensoras de las lenguas nacionales: Una simbiosis natural
¿Simbiosis de esperantismo y nacionalismo lingüístico?
38 Resolución Congresual
40 Resolución Congresual
43 Gran Diccionario Español-Esperanto
45 El movimiento Esperantista en España
47 El mayor catálogo de Esperanto en Internet
48 Cocinando con Pilar
49 Sin noticias de Dios
50 La Risa Rejuvenece

La enhavo de la tekstoj de ĉi tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de Astura Esperanto Asocio; pri ili respondecas la verkintoj mem.

La eldonado de ĉi tiu numero de la revuo estis subvenciita de la Fondaĵo pri Kulturo de la Gijona Municipio.

Leĝa Registro, n-ro 0/319/85

El contenido de los textos de esta revista no expresa la opinión oficial de la Asociación Asturiana de Esperanto; de ellos responden sus autores.

La edición de este número de la revista fue subvencionada por la Fundación de Cultura del Ayuntamiento de Gijón.

Depósito Legal, número 0/319/85



Santiago Mulas Gallego

Prezidanto de Astura Esperanto Asocio

Presidente de la Asociación Esperantista Asturiana

La antaŭa numero de nia revuo aperis ĝuste antaŭ unu jaro. De antaŭ kelke da tempo, ni eldonas nur unu numeron de HELECO ĉiujare, kaj tio eblas nur dank' al la subvencio kiun la Komisiono pri Kulturo de la urba Konsilantaro asignis al nia Esperantista Asocio.

Krom tiu signo de la ekzistado de nia esperantista rondo, kaj kiu celas propagandi en la socio pri la Internacia Lingvo, nia laboro favore al Esperanto kaj ties disvastigado konkretiĝas ankaŭ en la instruado. Ĝis la mezo de la jaro daŭris la kurso kiu komenciĝis en monato oktobro de la pasinta jaro, kaj kiam ĉi tiu revuo alvenos al la manoj de nia legantoj estos jam komenciĝinta nova kurso kiun ni estas organizante nun. Tiuj kursoj okazis/as laŭ nia kutima maniero, tio estas, en la Universitata Katedro, en kiu estas enkadrigita nia Esperanto-Asocio. Tio signifas ke ne konkretiĝis niaj planoj, kiujn ni menciis en nia antaŭa revuo, pri ebla kurso de Esperanto kun universitata rango laŭ la tipo je la "Lernejo de Idiomoj" de la Universitato de Oviedo. Fakte, ni faris demarŝojn por la organizado de tiu kurso, sed, malfeliĉe, la afero ne sukcesis ĉar ne eblis plenumi ĉiujn universitatajn postulojn por tiu tiaspeca kurso. Eble iam estonte eblos al ni realigi tiun planon.

Same ol en la antaŭaj jaroj, nia Esperanto Asocio partoprenis en la Festo de la Lingvoj okazinta en nia urbo en monato marto. Kiel sciante, la celo de tiu aranĝo estas konsciigi la publikon pri la neceso koni kaj kompreni aliajn lingvojn krom la propran, speciale en la kadro de la Eŭropa Unio. Laŭlonge de la festaj tagoj pasis tra nia tiea stando multaj gestudentoj el la lernejoj kaj gimnazioj invititaj viziti la fojron. Ĉi tiu estas destinata, ĉefe, al la gejunuloj, ĉar estas ili kiuj plej devos alfronti baldaŭ la problemaron de la lingva diverseco en tiu Eŭropa Unio en kiu ili devos vivi kaj labori. Al ili ni adresas nian mesaĝon pri la solvo al tiu problemo kiun konstituas la Internacia Lingvo "Esperanto". En nia oficiala mesaĝo de la Festo, kies bildo ni inkludas ĉi-tien, ni diris ke en la nuna monda situacio, kie kunekzistas granda diverseco de lingva kaj kultura vidpunkto kaj la procezo de tutmondiĝo kiu detruadas tiun

El número anterior de nuestra revista apareció justamente hace un año. Desde hace algún tiempo, editamos sólo un número de HELECO al año, y eso es posible solamente gracias a la subvención que la Comisión de Cultura de la Corporación Municipal concedió a nuestra Asociación Esperantista.

Además de ese signo de la existencia de nuestro círculo esperantista, y que tiene por objeto hacer propaganda en la sociedad acerca de la Lengua Internacional, nuestro trabajo en favor del Esperanto y su difusión se concreta también en la enseñanza. Duró hasta mediados de año el curso que había comenzado en Octubre del año pasado, y cuando esta revista llegue a las manos de nuestros lectores ya habrá comenzado un nuevo curso que estamos organizando ahora. Esos cursos tienen lugar según nuestro método de siempre, es decir, en la Cátedra Universitaria, en la que se encuadra nuestra Asociación de Esperanto. Eso significa que no se concretaron nuestros planes, que habíamos mencionado en nuestra revista anterior, sobre la posibilidad de un curso de Esperanto con rango universitario del tipo de la "Escuela de Idiomas" de la Universidad de Oviedo. De hecho, realizamos los trámites para la organización de ese curso, pero, lamentablemente, el asunto no prosperó ya que no fue posible cubrir todos los requisitos universitarios para tal curso. Quizá en el futuro nos sea posible realizar ese plan.

Al igual que en años anteriores, nuestra Asociación de Esperanto participó en la Fiesta de las Lenguas que tuvo lugar en nuestra ciudad en el mes de Marzo. Como es sabido, el objetivo de ese festejo es concienciar al público sobre la necesidad de conocer y comprender otros idiomas aparte del propio, especialmente en el marco de la Unión Europea. En el transcurso de los días de la Fiesta pasaron por el stand que teníamos allí muchos estudiantes de las escuelas e institutos invitados a visitar la feria. Esta iba destinada, especialmente, a los y las jóvenes, ya que son ellos los que más deberán afrontar pronto la problemática de la diversidad lingüística en esa Unión Europea en la que deberán vivir y trabajar. A ellos dirigimos nuestro mensaje sobre la solución a ese problema que constituye la Lengua Internacional "Esperanto". En nuestro mensaje oficial de la Fiesta, cuya imagen incluimos aquí, dijimos que en la actual situación mundial, donde coexiste una gran diversidad desde el punto de vista cultural y lingüístico, y el proceso de



diversecon favore al la lingvo kaj kulturo de hegemonia tutplaneda potenco, estas necese apliki taŭgan solvon kiu povas esti alportata nur de komuna, neŭtrala kaj facila lingvo kiel ponto de interkomunikado inter la diversaj popoloj de la mondo. Fakte, tiu estis poste nia mesaĝo al la gevizitantoj de nia stando en la fojrejo.

Koncerne al la interna vivo de nia esperantista Asocio, daŭris dum la raportata jaro la funkciado de la normalaj servoj de la Grupo destine al ties membroj: ĉiusemajnaj kunsidoj por praktikado de la lingvo, disdonado de la kotizitaj revuoj, servo de libro-pruntado fare de la asocia biblioteko... kaj speciale, la festado de la Zamenhofa tago, la 15a de decembro, kiu, pasinta jaro okazis en nia urbo por ĉiuj Esperanto grupoj de nia regiono, kaj ĉi-jare okazos en Avilés. Kiel kutime, la programeroj de tiu festado estis unue meso en Esperanto en la preĝejo de Sankta Nikolao de Bari, en la urbo-kvartalo "El Coto", proksime al la strato "Esperanto", kaj poste bankedo en restoracio de la sama kvartalo.

Fine, estas ankaŭ iu malĝoja informo: dum la lasta jaro forpasis tri el la membroj de nia Esperantista Asocio: Antonio Peña Sánchez kaj ties edzino Helena Sánchez Vigil, kaj Angel González Fernández. Ke ili pace ripozu.

globalización que destruye esa diversidad en favor de la lengua y cultura de una potencia hegemónica mundial, es preciso aplicar una solución apropiada que puede ser aportada sólo por un idioma común, neutral y fácil como puente de comunicación entre los diversos pueblos del mundo. De hecho, ese fue después nuestro mensaje a los visitantes de nuestro stand en el recinto de feria. Respecto a la vida interna de nuestra Asociación esperantista, continuó durante el año que reseñamos el funcionamiento de los servicios normales del Grupo con destino a sus miembros: reuniones semanales para la práctica del idioma, distribución de las revistas suscritas, servicio de préstamo de libros por la biblioteca de la Asociación... y especialmente, la celebración del día de Zamenhof, el 15 de Diciembre, que, el año pasado tuvo lugar en nuestra ciudad para todos los Grupos de Esperanto de nuestra región, y este año tendrá lugar en Avilés. Como de costumbre, la celebración de esa fiesta consistió primero en una misa en Esperanto en el templo de San Nicolás de Bari, en el barrio del "Coto", cerca de la calle "Esperanto", y después un banquete en un restaurante del mismo barrio.

Finalmente, hay también una noticia triste: durante el último año fallecieron tres de los miembros de nuestra Asociación Esperantista: Antonio Peña Sánchez y su esposa Helena Sánchez Vigil, y Angel González Fernández. Que en paz descansen.

Ildefonso Dominguez

La jaron 2000 estis la kvina centjaro de la naskiĝo de la imperiestro Karolo la 5a, la plej fama reĝo de sia epoko; pri li oni diris ke neniam la suno ĉesis prilumigi liajn teritoriojn. Multege oni verkis kaj parolis pri tiu reĝo okaze de la menciita datreveno. Oni verŝis, laŭ popola diraĵo, riverojn da inko por informi pri tiu reginto, tiel per ĵurnaloj, kiel per gazetoj, broŝuroj, k.a. Ankaŭ la ceteraj amas-komunikiloj, kiaj radio kaj televido reliefigis lian homan figuron samkiel lian historian gravecon.

Por festi lian memoron estis programitaj diversaj aktoj: prelegoj, ekspozicioj, muzik-konzertoj, film-projekcioj, kaj eĉ specialaj poŝtmark-serioj eldonitaj de la Hispana Fabriko de Mono kaj Poŝto kaj de la Poŝta Servo de Belgio.

Tiuj, kiuj antaŭe sciis nenion pri Karolo la 5a, havis okazon aliri al sufiĉe da informo pri li. Oni informis ke li naskiĝis en Ganto (Belgio) kaj travivis parton el lia junaĝo en Malinas. Li estis filo de Filipo (kromnomata "la bel-ega") kaj Johanino ("la frenezulino") filino de la hispanaj, "Katolikaj Gereĝoj" Ferdinando kaj Elizabeta; li heredis la tronon de la hispanaj regnoj: Kastilio, Aragono kaj Navaro, kaj ties de Napolo je la forpaso de lia avo Ferdinando, kiam li apenaŭ estis 17-jaraĝa, pro nekapableco de lia patrino. Tiam lia nobeltitolo estis "Duko de Borgonjo".

Kiam du jaroj poste, en 1519, forpasis lia patra avo Maksimiliano Habsburgo, germana imperiestro, li kandidatis al tiu imperiestra krono kaj sukcesis esti elektita kontraŭ la pretendo de la franca reĝo Francisko la 1a. Nia Karolo estis la unua de tiu nomo en la hispanaj regnoj, kaj lia nomo havis alian ordan numeralon en la ceteraj liaj regnoj: Aŭstrio, Napolo, Germanio, Nederlando... En multaj historiaj kronikoj de nia lando oni nomis lin

El año 2000 fue el quinto centenario del nacimiento del emperador Carlos V, el rey más famoso de su época; de él se dijo que jamás dejaba el sol de alumbrar sus dominios.

Se escribió y habló muchísimo sobre ese rey con ocasión del mencionado aniversario. Se vertieron ríos de tinta, según el dicho popular, para informar sobre ese gobernante, tanto en periódicos, como en revistas, folletos, y otros. También los demás medios de comunicación de masas, como la radio y la televisión pusieron de relieve su figura humana así como su importancia histórica.

Como conmemoración suya fueron programados diversos actos: conferencias, exposiciones, conciertos musicales, proyección de películas, e incluso series especiales de sellos de correos editados por la Fábrica Nacional (española) de Moneda y Timbre, y el Correo Belga.

Los que con anterioridad no sabían nada sobre Carlos V, tuvieron ocasión de acceder a bastante información sobre él. Se informó de que nació en Gante (Bélgica) y pasó parte de su juventud en Malinas. Era hijo de Felipe (llamado "el hermoso") y de Juana

("la loca") hija de los "Reyes Católicos", de España, Fernando e Isabel; heredó el trono de los reinos españoles: Castilla, Aragón y Navarra, y el de Nápoles, a la muerte de su abuelo Fernando, cuando apenas tenía 17 años de edad, por la incapacidad de su madre. Entonces su título nobiliario era "Duque de Borgoña".

Cuando dos años después, en 1519, falleció su abuelo paterno Maximiliano de Austria, emperador de Alemania, optó a esa corona imperial y consiguió ser elegido contra las pretensiones del rey francés Francisco I. Nuestro Carlos era el primero de ese nombre en los reinos españoles, y su nombre tenía otro ordinal en sus otros reinos: Austria, Nápoles, Alemania, Países Bajos... En muchas crónicas históricas de nuestro



Karolo la 1a de Hispanio kaj 5a de Germanio, sed la afero ne estis ĝuste tiel. Li portis la titolon "Karolo la 5a" jam dekomence, t.e. antaŭ lia elektado por la germana trono. La ordinalo 5a koncernis al lia titolo de Duko de Borgonjo, kiu estis lia unua titolo. Tamen oni devas klarigi ke el la dukaĵo de Borgonjo li havis nur la titolon, ĉar neniam li povis regi sur tiu teritorio. Borgonjo estis forprenita al iu lia praavo fare de la tiama reĝo de Francio, Ludoviko la 11a, kaj spitis al ĉiuj liaj klopodoj, neniam nia Karolo sukcesis rehavi tiun teritorion.

La historiistoj provizas multon da informoj pri tiuj kaj aliaj faktoj de tiu imperiestro: lia edziĝo al Elisabetino de Portugalio, liaj bataloj (kaj venkaj kaj malvenkaj), lia abdikado kaj retiriĝo al la monaĥejo de Iusto (Cáceres-Hispanio)...

Tre multe oni pri-traktis lian biografion, multege oni priskribis lian vivon, sed... laŭ mia opinio, estas grava manko en tiom da historia informado: oni informas nenion, eĉ ne hazarde, pri tio ke la unua hispana teritorio kien li alvenis per-



ŝipe el Nederlando estis Asturio. La Kardinalo Cisnero, tiama regento post la morto de Ferdinando, plendis pro tio ke la reĝo estis devigata elŝipiĝi en loko tiel neebena kaj malriĉa kia Asturio.

La flandraj kronikistoj, kiuj akompanis la reĝan sekvantaron, informis ke ili enŝipiĝis en Flesinga (Flandrio, Belgio) la 7an de septembro de la jaro 1517 kaj ke la reĝa floto konsistis el 40 ŝipoj. Karolo venis akompanata de kelkaj personoj el la plej alta stirpo, inter ili lia fratino Sinjorino Eleonora; Vilhemo de Kroj, Sro. de Ĉevres, reĝa guberniestro; monsinjoro Amon, reĝa konfesprenanto; Sro. Antonio de Villegas, hispana sekretario de la re-

país se le llama Carlos I de España y V de Alemania, pero la cosa no era exactamente así. El ostentó el título de "Carlos V" ya desde el principio, es decir, antes de su elección para el trono alemán. El ordinal correspondía a su título de Duque de Borgoña, que fue su primer título. Sin embargo se debe aclarar que del ducado de Borgoña tenía sólo el título, ya que nunca pudo gobernar ese territorio. Borgoña le fue arrebatada a un bisabuelo suyo por el rey de Francia, Luis XI, y pese a todos sus esfuerzos, nunca nuestro Carlos pudo recuperar ese territorio. Los historiadores suministran mucha información sobre ese y otros hechos de ese emperador: su matrimonio con Isabel de Portugal, sus bata-

llas (victorias y derrotas), su abdicación y retiro en el monasterio Yuste (Cáceres-España)... Se trató muchísimo su biografía, se describió muchísimo su vida, pero... a mi parecer, falta una cosa importante entre tanta información histórica: no se dice nada, ni siquiera por casualidad, acerca de que el primer territorio español a donde él llegó por barco desde Holanda fue Asturias. El Cardenal

Cisneros, a la sazón regente tras la muerte de Fernando, se quejaba de que el rey había sido obligado a desembarcar en un lugar tan pobre y poco llano como Asturias.

Los cronistas flamencos que acompañaban a la comitiva real informaron de que se había embarcado en Flesinga (Flandes, Bélgica) el 7 de septiembre de 1517 y que la flota real consistía en 40 barcos. Carlos venía acompañado de varias personas de la más alta estirpe, entre ellas su hermana doña Eleonor; Guillermo de Croy, Señor de Chevres, su ayo; monseñor Amon, confesor real; el Sr. Antonio de Villegas, secretario español del rey; los doctores Loys y Juan Hochstrate, y otros.

ĝo; doktoroj Lojs kaj Johano Hochstrate, k.a. Dum la marvojaĝo al Hispanio, la floton trafis forta ŝtormo, kiu okazigis grandan bruligon en la ŝiparo, pereinte 170 personoj kaj la plej multo el la ĉevalaro. Ankaŭ kelkaj ŝipoj estis perditaj pro la brulado. Fine la maraj flusoj alproksimigis la reĝajn ŝipojn al la astura marbordo, kie ili alordiĝis la 19an de septembro en la ĉirkaŭaĵoj de la fiŝurbeto kiu nuntempe nomiĝas Tazones, apartenanta al la municipo Villaviciosa.

La reĝa sekvantaro, ege laca kaj soifanta, petis akvon, kiun la vilaĝanoj, laŭ la astura tradicio, servis en grandaj bovloj aŭ tasegoj, nomataj "tazones" en la loka lingvo, el kio, supozeble, prenis sian nomon tiu urbeto. Nuntempe iu roko en tiu marbordo ricevas la nomon "Roko de l'Kaido" ĉar ŝajne ĝi estis la unua hispana planko kiun tuŝis la reĝo Karolo.

Post sufiĉe da trinkado kaj manĝado por plifortiĝo, la reĝa sekvantaro dankis al la vilaĝanoj ilian gastamecon kaj translokiĝis al Villaviciosa-urbo tra la estuario de Linares. Alveninte al tiu urbo, ĉar en ĝi ne estis adekvata haveno por elŝipiĝi la reĝo, iu vilaĝano translokiĝis lin ekde la reĝa ŝalupo portante lin sur siaj ŝultroj. Pro

tio, la reĝo nobeligiis tiun homon per la titolo "Markizo je reĝa transporto", kiun hereditas posteuloj. En Villaviciosa la reĝo restis dum kvar tagoj en la palaco de Sro Rodrigo Hevia, kantorestro de la katedralo de Oviedo, kaj vizitis la urbojn: Kolunga, Ribadesella kaj Llanes. En ĉi-lastaj ekzistas surmura plato kiu rememoras la pason de la reĝo tra la urbo. De ĉi-tie la reĝa sekvantaro foriris rekte al Sankta-Vincento-de-la-Barkera kaj poste al Tordesillo kaj Valladolido.

La nunaj geloĝantoj de Tazones fieras pri tiu historia okazintaĵo kaj festas ĝin ĉiujare ekde



Durante la travesía hacia España, alcanzó a la flota una fuerte tormenta, que ocasionó un gran incendio en los barcos, pereciendo 170 personas y la mayoría de la caballería. También se perdieron algunos barcos por el incendio. Finalmente las corrientes marinas acercaron los barcos reales a la costa asturiana, que abordaron el 19 de septiembre en los alrededores de la aldea de pescadores que actualmente se llama Tazones, perteneciente al municipio de Villaviciosa.

Los miembros de la comitiva real, muy cansados y sedientos, pidieron agua, que los aldeanos, según la tradición asturiana, sirvieron en unos grandes cuencos o tazas, llamados "tazones" en la lengua local, de lo que, se supone, tomó su nombre esa aldea. Actualmente una roca en esa costa recibe el nombre de "Roca del Caid" ya que al parecer ella fue el primer suelo español que pisó el rey Carlos.

Tras beber y comer bastante para fortalecerse, la comitiva real agradeció a los aldeanos su hospitalidad y se trasladó a Villaviciosa a través del estuario de Linares. Habiendo llegado allí, puesto que no había un puerto adecuado para desembarcar el rey, un aldeano lo transportó desde la chalupa real llevándolo a hombros. Por

eso, el rey ennobleció a ese hombre con el título de "Marqués del Real Transporte", que heredaron sus descendientes. En Villaviciosa el rey se quedó durante cuatro días en el palacio del Sr. Rodrigo Hevia, chantre de la catedral de Oviedo, y visitó las ciudades de: Colunga, Ribadesella y Llanes. En esta última existe una placa mural conmemorando el paso del rey por la ciudad. Desde aquí la comitiva real se marchó directamente a San Vicente de la Barquera y después a Tordesillas y Valladolid.

Los actuales habitantes de Tazones están orgullosos de ese evento histórico y lo celebran cada

la jaro 1981a, dum la lokaj festoj okazantaj en monato aŭgusto, elvokante la reĝan elŝipiĝon. La festa programero konsistas el kvazaŭ-teatra prezentado de tiu elŝipiĝo. Grupo da homoj, vestitaj per kostumoj de la 16a jarcento, simulas la reĝan sekvantaron de Karolo la 5a. Reĝan rolon ludas iu entuziasmo nomata Aŭrelino Nava Peon, kromnomata "Lelo" kaj "Lelín", kies vizaĝo kaj figuro sufiĉe similas al ties de la imperiestro Karolo en ĉi-ties plenaĝo. La ceterajn korteganojn estas lud-enkarnigitaj fare de diversaj personoj de la urbo, ne ĉiam la samaj. Ĉiuj ili en la difinita tago laŭ la festa programo alvenas al la havena kaĝo portante flagojn, standardojn kaj portretojn de la reĝo kaj estas bovenigataj de la spektant-publiko konsistanta el bruega homamaso. Poste la "reĝo" legas poemeton rakontante la travivitan tragikan navigadon ĝis finfine alveni al la hispana tero. La "reĝo" dankas la bonan akcepton de la tazonanoj kaj poste ĉiuj partoprenas en festo drinkante cidron -

anstataŭ akvon kiel okazis la 19a de septembro de la jaro 1517, servita en bovlegoj (tazonos). La publiko bonhumore kriegas: Vivu la reĝo!, Vivu nia imperiestro!, kaj ankaŭ: Vivu Aŭrelino! Oni disdonas ĉokolad-bombonojn kaj aliajn dolĉaĵojn al la geinfanoj kaj oni dancas laŭ la asturaj tradiciaj muzikiloj, sakfluto kaj tamburo, dancante laŭ tre antikva maniero nomata "danza prima" kaj ankaŭ laŭ pli modernaj kaj popolaj dancoj.

Pludaŭras la festado...
Venontjare, ankoraŭfoje Karolo la 5a elŝipiĝos en Tazonos, espereble.



año desde 1981, con ocasión de las fiestas locales en que tienen lugar en el mes de agosto, evocando el desembarco real. Este elemento del programa festivo consiste en una especie de presentación teatral de ese desembarco. Un grupo de personas, vestidas con trajes del siglo XVI, simulan la comitiva real de Carlos V. El papel del rey lo representa un aficionado llamado Aŭrelino Nava Peon, apodado "Lelo" y "Lelín", cuyo rostro y figura se parecen bastante a las del emperador Carlos en su edad adulta. Los demás cortesanos son encarnados por diversas personas de la ciudad, no siempre las mismas. Todos ellos, en día fijado por el programa festivo, se dirigen al muelle del puerto portando

banderas, estandartes y retratos del rey, y son recibidos por el público espectador formado por una ruidosa masa humana. Después el "rey" lee un poemita narrando la trágica travesía vivida hasta llegar finalmente a tierra española. El "rey" agradece el buen recibimiento de los tazonenses y

después todos participan en la fiesta bebiendo sidra -la bebida alcohólica típicamente asturiana- en vez de agua como el 19 de septiembre de 1517, servida en cuencos (tazonos). El público grita con buen humor: ¡Viva el rey!, ¡Viva nuestro emperador!, y también: ¡Viva Aurelio! Se distribuyen bombones de chocolate y otras golosinas a los niños y se baila al son de los tradicionales instrumentos musicales asturianos, gaita y tambor, un baile muy antiguo llamado "danza prima" y también otros bailes más modernos.

Continúa la fiesta...

El año que viene, de nuevo Carlos V desembarcará en Tazonos, esperemos.

JOVELLANOS

Julio Argüelles

En la jaro 1803, do ĝuste antaŭ du jarcentoj, estis pasanta la dua jaro de la prizoniĝo de Jovellanos en la kastelo de Bellver, Mallorko. Li estis enkondukita tien laŭordone de despota kaj nekompetenta regantaro havanta katastrofan eksteran politikon de fia kaj lakea submetiĝo al la tiama imperiismo. Nun estas konvena okazo por memori tion, kiam alia regantaro same fia enkondukis nian landon en iun imperiisman aliancon kaj militon kiu senhonorigas nin.

Gaspar Melchor de Jovellanos naskiĝis en Gijón la 5a de januaro de la jaro 1744. Siaj gepatroj, kvankam apartenantaj al la nobelaro, ne ĝuis multajn rentojn kaj nur tre pene ili sukcesis subteni naŭfilan familion. En Gijono li faris sian unuan lernadon, pasante poste por fari studojn pri filozofio en la Universitato de Oviedo, kie estante li 13-jara, oni aplikis al li la unuan tonsuron por ebligi ke li povu ricevi iun eklezian stipendion. Li pasis poste al Avila, kie faris studojn en la Seminario. Li atingis la gradon je Abituriento pri Kanonoj laŭ la Universitato de Osma la 9a de junio de 1761, aldonante la titolon al de Avila la 3a de novembro de 1763, licenciĝinte sekvinttage. La 10a de majo de la sekva jaro li estis elektita kolegiano de la «Mayor de San Ildefonso» de Alcalá de Henares, atingante licenciĝon en tiu universitato. En junio de la jaro 1767 li konkursas, sensukcese, celante katedron pri Kanonoj de la sama universitato. Li rezignis pri sia eklezia kariero kaj lia vivo prenas alian direkton. La 31a de oktobro de 1767 la reĝa konsilantaro proponas lin kiel Estro de la Reĝa Aŭdienco de Seviljo, posteno kiun la Reĝo asignas al li la 13a de februaro de 1768. Tiam li estis nur 24-jara kaj nulan sperton pri la juĝista ofico, sed havis ian delikatan senson pri la justeco kaj enorman alvokiĝon pri la studo.

Sia sevilja etapo daŭris dekunu jarojn. En tiu urbo li dediĉiĝis avide legi francan, anglan kaj italian literaturon. Estis en tiu epoko kiam li iniciĝis pri la ekonomiaj kaj historiaj problemoj, pri la reformo de la instruado, la literaturaj novaĵoj... Ĉi tiu intelekta evoluado de Jovellanos disvolviĝis en la kleraj rondoj de Seviljo, kie elstaris la figuro de Pablo de Olavide. Laŭ la priskribo kiun tiam faris pri li Ceán Bermúdez, Jo-

En 1803, o sea hace justamente dos siglos, corría el segundo año de la reclusión de Jovellanos en el casti- llo de Bellver, Mallorca. Había sido conducido allí por orden de un Gobierno despótico e incompetente con una política exterior desastrosa, de sometimiento abyecto y lacayuno al imperialismo de la época. Es una buena ocasión para recordarlo ahora, cuando otro Gobierno igualmente indigno condujo a nuestro país a una alianza y una guerra imperialista que nos deshonra.

Gaspar Melchor de Jovellanos nació en Gijón el 5 de enero de 1744. Sus padres, aunque pertenecientes a la nobleza, eran escasos de rentas y se vieron agobiados para poder sacar adelante a sus nueve hijos. En Gijón estudió las primeras letras, pasando a cursar filosofía a la Universidad de Oviedo, en donde a la edad de 13 años se le confirió la primera tonsura para poder obtener un beneficio eclesiástico. Pasó después a Avila, donde cursó en el Seminario. Se graduó de Bachiller en Cánones por la Universidad de Osma el 9 de junio de 1761, incorporando el título a la de Avila el 3 de noviembre de 1763, licenciándose al día siguiente. El 10 de mayo del siguiente año fue elegido colegial del Mayor de San Ildefonso de Alcalá de Henares, graduándose en esta universidad. En junio de 1767 oposita, sin éxito, a una cátedra de cánones de la misma universidad. Renuncia a su carrera eclesiástica y su vida cambia de rumbo. El 31 de octubre de 1767 el Consejo de Cámara propone a Jovellanos Alcalde de la Real Audiencia de Sevilla, cargo para el que el Rey le nombra el 13 de febrero de 1768. Tenía entonces sólo 24 años y una experiencia nula en la magistratura, pero un exquisito sentido de la justicia y una enorme vocación por el estudio. Su etapa sevillana duró once años. En esa ciudad se dedicó a leer febrilmente literatura francesa, inglesa e italiana. Es durante este tiempo cuando se inicia en los problemas económicos e históricos, la reforma de la enseñanza, novedades literarias... Esta evolución intelectual de Jovellanos se desarrolló en los círculos ilustrados de Sevilla, en los que predominaba la figura de Pablo de Olavide. Según la descripción que por entonces hizo de él Ceán Bermúdez, Jovellanos era de estatura proporcionada, más alto que bajo... sobrio en el comer y beber, atento y comedido en el trato...

vellanos havis proporcian staturon, pli alta ol malalta... modera en la manĝado kaj la drinkado, atentema kaj trankvila en la persona traktado... li estis religiema sen zorgo, senartifika kaj senafekta, amanto de la vero, de la ordo kaj de la justeco; firma en siaj decidoj, sed ĉiam milda kaj bonanima kun la paŭperaj; konstanta en la amikeco... nelacigebla en la studo kaj rezistanta kaj forta por la laboro. La 15a de marto de 1774 li ascendis al la posteno de aŭditorio de la sama aŭdienco de Seviljo, kaj de tiam li estis iu el la plej elstaraj membroj de ĝia Regantaro. Oni konservas ankoraŭ kelkajn el la informoj kiujn li redaktis en la plenumado de de tiu tasko. Restis bona famo de lia jura agado en Seviljo, samkiel ol lia posta politika vivo-kurso en Madrido. Li ĉiam estis preta plenumi la leĝon kaj protekti la ordinaran jurisdikcion antaŭ la multeco de specialaj kaj eksterordinaraj leĝaroj kaj la privilegioj de la nobelaro. Pri tio ni vidas en li iun aktivan partionon de la socia evoluo de tiu socio ankoraŭ tro feŭdisma al la valoroj de la nuntempa mondo. Spit' al ĉio, ne mankis al li kontraŭdiroj en tiu procezo; restis for de la perspektivoj de la epoko la prikonsidero de demokratia politika sistemo, eĉ inter la plej progresistaj el la kleruloj. Fakte, en la penso de Jovellanos daŭre estis la nobelaro la socia klaso komisiita por la gvidado kaj demarŝado de la socio, sed anstataŭante la antikvan koncepton de honoro, kiu elvokas la gravecon de la nobelaj stirpoj, per tiu de virto, kiu rilatas al la kapablo kaj taŭgeco por la okupado de postenoj. En tiuj jaroj li verkis la tragedion *Pelajo* kaj la dramon *La honesta deliktulo*. Ĉi lasta verko respegulas lian zorgon pri la necesaj reformoj en la puna sistemo de la epoko.

La 27a de aŭgusto de 1778 la Reĝo nomumis lin Kortum-estro. Devigita forlasi Seviljon, en monato oktobro li eliras destine al Madrido «larmobane», laŭ esprimo de li uzata en sia Taglibro. Ŝajnas ke lia sevilja etapo estis por li profita ankaŭ en la sentimentala tereno, kvankam sia privata kaj sentimentala vivo estas sufiĉe malkonata de ni, male ol sia publika, profesia, oficiala kaj politika vivo. En la ĉefurbo oni elektis lin membro de la plej gravaj el la kulturaj institucioj: li ricevas honorojn kaj nomumoj; lia aktivado estas enorma; li partoprenas en ekonomiaj konsilantaroj, prezidas kunvenojn de anonimaj societoj nome de la reĝo, okupiĝas pri siaj akademiaj taskoj, oni komisiis al li la redaktadon de diskursoj kaj laŭdoj, li partoprenas en kulturaj rondoj... Tiaj postenoj kaj nomumoj havis rilaton kun sia ĵura kariero sed ili havis ankaŭ ian ka-

era religioza sin preocupaci3n, ingenuo y sencillo, amante de la verdad, del orden y de la justicia; firme en sus resoluciones, pero siempre suave y benigno con los desvalidos; constante en la amistad... incansable en el estudio y duro y fuerte para el trabajo. El 15 de marzo de 1774 ascendió a oidor de la misma audiencia de Sevilla, y desde entonces fue uno de los miembros más destacados de su Sala de Gobierno. Se conservan aún algunos de los informes que redactó en el desempeño de ese cargo. Dejó una buena imagen de su actuación judicial en Sevilla, al igual que de su ejecutoria política de los años siguientes en Madrid. Se mostró siempre deseoso de cumplir la ley y de salvaguardar la jurisdicción ordinaria frente a la multiplicidad de fueros especiales y extraordinarios y los privilegios de la nobleza. En eso vemos en él un decidido partidario de la evolución social desde aquella sociedad todavía muy feudal hacia los valores del mundo contemporáneo. Con todo, ese proceso no carecía de contradicciones en él; estaba fuera de las perspectivas de la época el contemplar un sistema político democrático, incluso entre los más avanzados de los ilustrados. De hecho, en el pensamiento de Jovellanos seguía siendo la nobleza el estamento social encargado de la dirección y gestión de la sociedad, si bien sustituyendo el antiguo concepto del honor, que remite a la importancia de los linajes nobiliarios, por el de virtud, que se refiere a la capacidad y la idoneidad para la ocupación de cargos. En esos años escribió la tragedia *Pelayo* y el drama *El delincuente honrado*. Esta última obra refleja su preocupación por las reformas necesarias en el sistema penal de la época. El 27 de agosto de 1778 el Rey le nombra Alcalde de Casa y Corte. Obligado a abandonar Sevilla, en octubre sale para Madrid «bañado en lágrimas», según expresión utilizada por él en su Diario. Parece ser que su etapa sevillana había sido para él fecunda también en el terreno sentimental, aunque su vida sentimental y privada nos es bastante desconocida, al contrario de lo que ocurre con su vida pública, profesional, oficial y política. En la capital es elegido miembro de las instituciones culturales más importantes: recaen sobre él honores y nombramientos; su actividad es inmensa; forma parte de juntas económicas, preside reuniones de sociedades anónimas en nombre del rey, atiende a sus tareas académicas, le encargan discursos y elogios, participa en tertulias... Tales cargos y nombramientos están relacionados con su carrera judicial pero tienen también cierto carácter de función política en conexión con tareas ministeriales y gubernamentales en áreas de la economía, la enseñanza y lo que entonces existía de beneficencia

rakteron de politika funkcio konekse kun ministrejaj kaj registaraj taskoj en terenoj de la ekonomio, la instruado kaj tio ekzistanta tiam pri publika bonfarado. Li estis akceptita en la Madrida Ekonomia Societo, en la Akademio de la Historio, en la Hispana Akademio kaj en tiu de Kanonoj. La 21a de aŭgusto de 1780 li ascendis al konsilantano de la Militaj Ordenoj. Oni komisiis al li la redaktadon de diskursoj; en la sama jaro 1780 li verkis tiun de la Markizo «de-los-Llanos», en kiu tio, kio ŝajne estis ia laŭdo al Karolo la 3a, fakte konstituis ian subtilan kritikon. En la jaro 1782 li prononcas en la Ekonomia Societo de Oviedo iun diskurson en kiu li skizas planon de la industria reformo de Asturio. Laŭŝajne, ĉiam kun la malfacilaĵoj ekzistantaj kiam oni intencas esplori lian privatitan vivon, en Madrido li refaris iun am-aferton kiu li estis komencinta en Seviljo, kiu kulminis per fiasko tre doloriga por li. Kaj poste li havis alian am-aferton, ĉi-foje kun iu sinjorino kiu rilatis kun la germana ambasadejo; el ĉi tiu afero naskiĝis iu infano, pri kiu oni ne plu sciis poste, kaj malaperas ankaŭ sia patrino el la vivo de Jovellanos, en kiu ne plu estis jam am-aferoj.

La 31a de marto de la jaro 1790 la reĝo nomumis Jovellanos-n inspektisto de la Kolegio de Kalatravo. La hispana politiko ŝanĝis kiam estis entronigita Karolo la 4a, koincidante ankaŭ kun la komenciĝo de la Franca Revolucio. Tiam komenciĝis la malfacilaĵoj por Jovellanos kiuj kulminis per sia ekzilio en Gijón. Jovellanos ne ĝuis multajn simpatiojn en la nova Kortumo. Tiuj tajdoj en sia politika fortuno devas esti komprenitaj kadre de la interfrontiĝo tiam ekzistanta inter la politikaj grupoj, la modera, tradiciisma, prezidita de la grafo Floridablanka kaj tiu de la kleranoj, poste nomataj liberaloj, inter kiuj troviĝis Jovellanos. Ekde la jaro 1790 al 1797 li restas ekzilita en Asturio, se vivi en tiu ĉi regiono oni povas esti nomata «ekzilo». Estis tiu iu el la periodoj intelekto plej profitonaj por Jovellanos, kiam li estis jam 45-jaraĝa. En Gijón li metis finon al la verkado de la *Informe en la afero de la Agrara Leĝo* kaj la *Raporto pri la publikaj spektakloj*. Fine de la jaro 1795, publikigita jam la *Informe en la afero de la Agrara Leĝo*, la Inkvizicio intencis malpermesigi la verkon de Jovellanos, kvankam ne sukcesis tion fari ĉar la prestiĝo de tiu aŭtoro multe estis altiĝinta. En novembro de 1797 Jovellanos estas nomumata ministro pri Justico. Tiu ĉi politika releviĝo enkadriĝas, denove, en la balanciĝo de la politika evoluo de Hispanio; estis komenciĝanta tiam la stranga periodo de la reĝa favoro de Godoj. No-

pública. Ingresó en la Sociedad Económica Matritense, en la Academia de la Historia, en la Academia Española y en la de Cánones. El 21 de agosto de 1780 ascendió a consejero de las Ordenes Militares. Se le encargaba la redacción de discursos; en el mismo año 1780 escribió el del Marqués de los Llanos, en el cual lo que aparentemente era un elogio a Carlos III, constituía en realidad una sutil crítica. En 1782 pronuncia en la Sociedad Económica de Oviedo un discurso en el que esboza un plan de la reforma industrial de Asturias. Parece ser, siempre con la dificultad existente al tratar de rastrear su vida privada, que en Madrid rehizo una relación sentimental que había iniciado en Sevilla, que culminó en doloroso fracaso para él. Y después tuvo otro romance, esta vez con una dama relacionada con la embajada alemana; de esta relación nació un niño, del que después no se vuelve a saber nada más, y desaparece también su madre de la vida de Jovellanos, en la que no volvió a haber ya más relaciones sentimentales.

El 31 de marzo de 1790 el rey nombró a Jovellanos visitador del Colegio de Calatrava. La política española cambió al ser entronizado Carlos IV, en coincidencia también con el comienzo de la Revolución Francesa. Empezaron entonces los momentos difíciles para Jovellanos que terminarán con su destierro en Gijón. Jovellanos no gozaba de muchas simpatías en la nueva Corte. Esos altibajos en su fortuna política deben ser entendidos en el contexto del enfrentamiento entonces existente entre las corrientes moderada, tradicionalista, presidida por el conde de Floridablanca y la de los ilustrados, después llamados liberales, entre los que se encontraba Jovellanos. Desde 1790 a 1797 permanece desterrado en Asturias, si es que se puede llamar «destierro» a vivir en esta región. Fue ese uno de los períodos más fecundos intelectualmente para Jovellanos, cuando contaba ya 45 años de edad. En Gijón termina el *Informe en el expediente de Ley Agraria* y la *Memoria sobre los espectáculos públicos*. A finales del año 1795, publicado ya el *Informe en el expediente de la Ley Agraria*, la Inquisición intentó prohibir la obra de Jovellanos, aunque no lo consiguió porque el prestigio de ese autor había crecido mucho. En noviembre de 1797 Jovellanos es nombrado ministro de Gracia y Justicia. Esta recuperación política se enmarca, de nuevo, en los vaivenes de la evolución política española; comenzaba el singular período de la privanza de Godoy. Nuevas vicisitudes esperaban a Jovellanos en la Corte. Por lo que parece, Jovellanos había sido llamado al ministerio para que reformara los estudios universitarios, para que diera cauce legal a las medi-

vaj sorto-ŝanĝoj atendis al Jovellanos en la Kortumo. Laŭŝajne, Jovellanos estis farita ministro por reformi la universitatajn studojn, por ke li donu leĝan kurson al la disponoj defenditaj en sia *Informe en la afero de la Agrara Leĝo*, kaj por malpliigi la forton de la reaktia partio, subvide de la Inkvizicio. La amplekso de la taskoj tro pretersuperis la tempon je kiu disponis la eminenta gijonano por ilin efektiviĝi. Oni ĉesigis lin kiel ministro post ok monatoj. En la jaro 1800 ekfuriozas feroce batalo kontraŭ ĉio signifanta promeson de progreso en Hispanio. En la oficialaj sferoj kaj konkrete en la leteroj de Godoj al la reĝino Maria Luisa, Jovellanos estis konsiderata kiel kapo de la klera grupo kiun oni pretendis detrui. Oni arestis lin la 13a de marto de 1801 kaj oni kondukis lin al la kartuzia monaĥejo de Valldemosa, en Mallorko, kaj la sekva jaro oni enprizonigas lin en la kastelo de Bellver kie li restos ĝis la 22a de marto de 1808, post la faliĝo de la ministro Godoj kaj la entroniĝo de Ferdinando la 7a.

Poste venis la nacia katastrofo kiu tiom efikis sur nia lando: frukto de la fuŝa politiko kiun dum kelkaj jaroj estis farinta Godoj, okazis la sekvestro, fare de Napoleono, de la reĝa familio de Hispanio kaj la franca okupado de nia teritorio, rekonkerita poste preze de akra sepjara milito. La klera grupo de 1797 disiĝas: iuj pensas ke Napoleono kaj Josefo Bonaparte kapablos solvi la problemojn de Hispanio, dume aliaj konsideras ke oni devas entrepreni laŭ hispana stilo la taskon de la renovigo de la lando. La unuaj volas varbi Jovellanos-n, kaj eĉ nomumas lin ministro de la reĝo Josefo. Tamen li akceptas en septembro lian nomumon kiel peranto de la Konsilio de Asturio en la Centra Konsilio. Kune kun ĝi Jovellanos iras de Madrido al Seviljo kaj fine a Kadizo. Estis Jovellanos kiu ellaboris la projekton de la Parlamento.

Starigita la Regenteco la 31a de januaro de 1811, Jovellanos mendas permeson por translokiĝi al Asturio; li ekvojaĝas marvoje la 26a de februaro, sed iu ŝtormo devigas lin alborde la galician marbordon, restante en Muros-de-Noja ĝis kiam, liberigita Gijono el la franca soldataro, li decidis reveni la 7a de aŭgusto al sia naskiĝurbo, kie oni ricevis lin kun grandaj honoroj. Sed denove la franca armeo okupas Gijonon kaj Jovellanos devas fuĝi marvoje la 6a de novembro. Malsana je pneŭmonito, li haltas en Puerto-de-Vega, kie li mortas la 27a de tiu monato, kiam li estis 68-jaraĝa.

Nuntempe ĉiuj konsentas pri tio ke Jovellanos estas la plej tipa figuro de la 18a jarcento hispa-

